

Richard von Schaukal,
Sub vintraĵ steloj

tradukita de Manfred Retzlaff

La nokt' silentas sub la rond' ĉiela,
Multoble brilas stela lum-radi'.
El iu foro venas spir' alŝvela,
Resinkas en tegitan grundon ĝi.

Rigardas mi l' trembrilon en trankvilo,²
La nigra volb' etendas larĝe sin!
Ne sentas mi min en la fremda brilo,
La senfinco superfortas min.

*Traduko de la Germana poemo "Unter Wintersternen" de RICHARD VON SCHAUKAL (*1874-05-27 – †1942-10-10) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-637-1283 (2013-07-27 19:19:27)

Tiu ĉi poemo aperis en 1989-01-29 en la germana eklezia gazeto "Bistumszeitung Münster", sur pago 2.

²aŭ:

Rigardas mi la stelojn en trankvilo,